

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

KONGRESO DE LA
BULGARA KULTURO

KUN BOTEVA FLAM'
EN LA KORJOJ

„HUMURO KAJ
SATIRO '83“
EN GABROVO

LA UNUA ALAŬDO

VELBOATO
„ESPERANTO“

JUBILEO DE LA
BULGARA E-MUZEO

GASTAMA MARO,
ORAJ SABLOJ
KAJ ... ESPERANTO



JARO 52 • 0 • RO 7 • JULIO • 83

Kun Boteva flam' en la koroj



Grupo por Arta Parolo „Steletu“, Kjustendil, kun artgvidantino Maria Lalova — gajninto de la Granda Premio

En la bela suntago, la 28-an de majo ĉi-jare en la Distrikta Junulara Domo en Vraca regis vigleco kaj internacia E-etoso: en la bele ornamita salono verdis rubandoj kaj bukedetoj el geranio sur la brustoj de la 150 partoprenantoj kaj gastoj en la III Internacia Konkursorecitalo de Boteva kaj Bulgara Revolucia Poezio en Esperanto. La aranĝo okazis en kadre de la tradiciaj kulturaj festoj „Botev-tagaj '83“, dediĉitaj al la 2-a de junio — Tago de Botev kaj la de pereintoj en la batalo kontraŭ la osmana jugo, kapitalismo kaj faŝismo kaj en la Patrolanda Milito.

En la ĉi-jara Recitalo-Konkurso partoprenis 34 individuaj kaj 5 kolektivaj plenumantoj el Bulgario, USSR kaj Pollando — precipe gejunuloj, ravitaj de la senmorta poezio de la granda revoluciulo kaj internaciisto Ĥristo Botev.

Botev apartenas al la plejado de bulgaraj poetoj, kiuj postlasis daŭran kaj neforviŝeblan spuron en la psiko kaj en la kulturo de la bulgara popolo. Kaj per sia verkaro, kaj per

sia heroa morto li respegulas la spiriton de sia rimarkinda epoko. Tio estas la 60-aj kaj 70-aj jaroj de la pasinta jarcento, kiam en Bulgario bolis preparlaboro por naciliberiga revolucio, kiam evoluis la batalo por socia justeco. La epoko karakterizigis per revolucia streĉiteco en tuta Eŭropo. Disvolvigis la naciliberigaj bataloj de la itala kaj pola popoloj. Sur la historia scenejo aperis la laborista klaso kaj montris sian forton. En 1864 Karl Marx fondis la I Internacion; en 1871 estis proklamita la Pariza Komuno. En Rusio la revoluciaj demokratoj Hercen, Ĉerniŝevskij, Dobroljubov direktis la batalon de l'kamparanoj kontraŭ la carismo. Ekribelis Bosnio kaj Hercegovino, la serboj kelkfoje militis kontraŭ la osmanaj subpremantoj. La batalo de la bulgara popolo estas parto de la granda konflikto de la eŭropaj popoloj kun la tiraneco.

La liberama spirito de Botev konceptis la batalon de la popoloj necesa por ilia evoluo. Brava personeco, li mem estigis revoluciulo kaj

(sekvas sur p. 3)



KONGRESO DE LA BULGARA KULTURO

Bulgario, situanta meze de la Balkana Duon-insulo, estas lando malgranda laŭ teritorio, sed ĝi havas multjarcentajn kulturajn tradiciojn kaj kontribuis por pliriĝigo de la monda kultura trezorejo.

La kongresoj de la kulturo en socialisma Bulgario jam estas tradiciaj revuoj de la atingoj de l'kreantoj kaj agantoj de la bulgara nacia kulturo.

De la 25-a ĝis la 27-a de majo j. k. en la Nacia Palaco de Kulturo „Ljudmila Jivkova“ en Sofio okazis la IV Kongreso de la Bulgara Kulturo. Tiun ĉi gravan kaj aŭtoritatan forumon partoprenis bulgaraj kulturagantoj kaj gastoj el multaj landoj.

La periodo inter la III kaj IV kongresoj de la bulgara kulturo karakteriziĝas per vigla kaj senĉesa kresko de la socia rolo de la bulgara kulturo kaj arto, per krea aktivado de la loĝantaro, per apero de novaj altkvalitaj verkoj en ĉiuj sferoj de la arto. Sofio transformiĝis en kulturenan centron, kie oni okazigis vicon da altrangaj internaciaj aranĝoj kaj Popola Respubliko Bulgario ludas ĉiam pli aktivan rolon en la monda kultura evoluo. Dum tiu periodo altiĝis la figuro de Ljudmila Jivkova kiel granda kreanto kaj gvidanto de la kulturaj procezoj en nia lando, kiel iniciatinto de la Internacia Movado „Standardo de la Paco“, kiel organizanto de vico da longdaŭraj programoj, celantaj praktikan efektivigon de la partiaj postuloj por disvastigo de la tutpopola movado por estetika edukado. Sub ŝia senpera gvidado jam estis realigitaj kvar etapoj de la Longdaŭra Programo por Harmonia Evoluo de la Personeco. Memorindaj estas ŝiaj paroladoj desur la tribunoj de UN kaj de la Generala Asembleo de UNESKO.

Inter la du kongresoj konsiderinde kreskis la materiala-teknika bazo de la institutoj pri kulturo, pli variaj estiĝis la formoj kaj pliboniĝis

la rimedoj por kultura agado inter la loĝantaro, pli alireblaj estiĝis la kulturaj valoraroj. Post 1977 estis konstruitaj 8 novaj teatroj, el ili 6 — por junaj spektantoj. En 1981 en la teatroj estis prezentitaj 401 bulgaraj teatraĵoj. Dum 6 jaroj la nombro de belartaj ekspozicioj duobliĝis, kaj la nombro de iliaj vizitintoj kreskis per 66%. Estis formitaj 9346 trupoj de belarta amatora agado, kiujn partoprenas 136 190 amatoroj.

En la lando funkcias 221 muzeoj, ĉiujare vizitataj de 16 milionoj da vizitantoj, el kiuj 20% estas eksterlandanoj. Lige kun la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato 21 muzeoj ricevis novajn konstruaĵojn, renovigis kaj pliriĝigis siajn ekspoziciojn.

En la lando funkcias 10 053 bibliotekoj kun fonduso de preskaŭ 98 645 000 libroj.

La Bulgara Nacia Radio elsendas sian programon dum 316 horoj jare, kaj la Bulgara Televido elsendas 5028-horan jaran programon (96% el la elsendoj estas koloraj).

Rekono kaj atesto pri la sukcesoj de la bulgara arto estas la multnombraj distingo — naciaj kaj internaciaj. Inter la du kongresoj en 30 internaciaj muzikaj konkursoj bulgaraj muzikartistoj gajnis 142 premiojn kaj distingojn; la filmagantoj gajnis 132 premiojn kaj la amatoroj partoprenis en 45 konkursoj, gajninte 96 premiojn, el kiuj 49 unuaj premioj.

Al sia IV kongreso la kulturagantoj venis kontentaj pri siaj atingoj, pretaj konkeri novajn suprojn de la bulgara socialisma kulturo.

La Bulgara Esperantista Asocio estas unu el la plej agemaj kulturklerigaj organizaĵoj en la kadro de la Patrolanda Fronto. Ĝiaj ĉiujaraj kompleksaj programoj inkludas multajn interesajn landajn kaj internaciajn aranĝojn, kiuj ege kontribuas por pliriĝigo, disvastigo kaj popularigo de l'atingoj de la bulgara nacia kulturo en la lando kaj eksterlande.



Georgi Jordanov, prezidanto de la Komitato de Kulturo, raportas antaŭ la delegitoj de la IV Kongreso de Bulgara Kulturo

La bulgaraj esperantistoj estas ardaĵoj kaj viglaj kulturagantoj. Ili amase partoprenas la naciajn revuojn de E-Parolo kaj Kanto, kiuj okazas ĉiujare en diversaj lokoj de la lando, la internaciajn recitalojn de Boteva kaj Bulgara Revolucia Poezio en Vraca kaj de Vapcarov-Poezio en Bansko, la Tagojn de E-Kulturo en Sofio, la konkursojn de Originala kaj Traduka Poezio kaj Prozo en Loveĉ kaj Jambol kaj multajn aliajn aranĝojn. Niaj elstaraj E-kantistoj Veselin Damjanov, Maria Angelova, Mišo Zdravev, Dimităr Denĉev, Radka Malamova, Karamfilka Adamova, la Bulgara E-Teatro (en la persono de la geaktoroj Belka Beleva, Anani Anev, Miĥail Cobanov, Angelina Sotirova) — ĉiuj ili pere de la Internacia Lingvo grave kontribuas por popularigo de la bulgara kulturo enlande kaj eksterlande. Ili jam estas bone konataj ne nur al la bulgara publiko, sed gajnis la rekonon de spektantoj el multaj aliaj landoj: Sovetunio, Greklando, Italio, Hispanio, FRG, GDR, Pollando, Hungario. Francio ktp.

La partopreno de BEA en gravaj naciaj jubileaj celebradoj (1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, 90-jariĝo de la Bulgara Komunista Par-

tio, 60-jariĝo de la unua en la mondo kontraŭfaŝisma ribelo en septembro 1923 ka.) estas pruvo pri la patriotismo de la bulgaraj esperantistoj.

La enkonduko de Esperanto en la IX kaj X klasojn de la mezlernejoj en la lando; la centoj da kursoj de Esperanto por komencantoj kaj progresintoj, la agado de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica (Rodopi-montaro), la eldonagado de BEA — ĉio ĉi vicigas la bulgaran E-movadon inter la plej aktivaj en la tuta mondo.

Per siaj originalaj verkoj kaj tradukoj niaj elstaraj esperantaj poetoj Asen Grigorov, Hristo Gorov, Ljuba Bojaĝieva, Penka Batoeva; niaj elstaraj E-ĵurnalistoj kaj sociagantoj Nikola Aleksiev, Ivan Keremidĉiev, Violin Oljanov, Kunĉo Vălev, Krâstju Karucin ka., aktivadas sur nacia kaj internacia kampo kaj popularigas la atingojn de socialisma Bulgario.

La Bulgara Esperantista Asocio plenmerite gvas la altan pritakson kaj apogon de BKP kaj de la popola registaro, ĉar la nobla kultur-kleriga agado de la bulgaraj esperantistoj estas nedisigebla parto de la tutpopola krea laboro por disfloro de la naciaj kulturo kaj arto.


KUN BOTEVA FLAM' EN LA KORJOJ

(daŭrigo de p. 11)

esprimanto de la progresemaĵoj de sia epoko. La lecionoj de la pasinteco kaj la nuntempo helpis al li enrigardi en la estonton kaj direkti la klopodojn de la popolo al tiu hela estonto.

La ideologio de Hristo Botev esprimas la strebojn de la plej revolucia parto de la bulgara socio — la proletiganta etburgaro kaj vilaĝanaro, kiujn li nomas per la komuna titolo „malriĉularo“. En la malriĉularo li vidis la forton de la estonta revolucio kaj de la estontaj socialaj ŝanĝoj. Por Botev la revolucio estis sola vojo al nacia, politika kaj sociala libero. La tasko de la bulgara popolo estis ne nur renversi la osmanan regpotencon, sed ankaŭ liberigi el sub la sociala subpremado de la bulgaraj ĉorbaĝioj¹. Li ne malamis la turkan popolon — Botev malamis la turkajn beĝojn kaj iliajn helpantojn — la ĉorbaĝiojn. La klasa malamo al ĉiuj subpremantoj kaj ekspluatantoj estas karakteriza trajto de la

Nevjana Krăsteva — Sofio, gajninta la unuan premion



Botev-ideologio. Li elstaras kiel fervora esprimanto de la demokratia revolucio.

Botev estas patrioto kaj internaciisto. Li dediĉis sian vivon kaj verkaron al la liberigo kaj progreso de la bulgara popolo. Kontraŭulo de ĉiusepa ŝovinismo, li subtenis la ideon pri Balkana Federacio kiel kondiĉon por demokratia evoluo de la frataj balkanaj popoloj. Botev arde subtenis la batalon de ĉiuj subpremataj popoloj kontraŭ la tiraneco kaj revis pri ilia estonta interkompreniĝo kaj kunlaborado en la kondiĉoj de socialismo kaj komunismo.

Per sia senkompromiseco kaj pasio, per sia mobilizanta forto la Botev-poezio efikis sur la mensojn kaj korojn de liaj samtempuloj. Li testamentis al la patriotoj la idealon pri nacia liberigo kaj socialaj ŝanĝoj. La versaĵoj „Elegio“, „Batalo“ kaj „Mia preĝo“ apartenas al la civitana-filozofia liriko de la bulgara poezio. Ili metis fruktodonan komencon de nia proleta poezio.

Post la fino de la Recitalo okazis renkontiĝo de la ĵurio kun la gvidantoj de artkolektivoj kaj individuaj plenumantoj. Angelina Sotirova — prezidantino de la ĵurio, turnis apartan atenton al la sceneja dislokigo de la plenumantoj, al iliaj gestoj kaj mimiko. Ili devas, ŝi substrekis, adresi sian plenumon al la publiko, sed ne al la malplena spaco. Tre grave estas ankaŭ kontroli la laŭtecon de sia voĉo depende de la grandeco de la salono. Si tuŝis ankaŭ specifikaĵojn de la recita majstereco. La ĵurianoj menciis iujn malnovajn malperfektaĵojn — neadekvataj gestoj, tro rapida recitado, superflua patoso, malbona prononcado kaj reduktado de vokaloj. Denove estis substrekita la neceso pri kompetenta helpo fare de reĝisoroj, aktoroj, pedagogoj, elstaraj amatoraj plenumantoj kaj muzikistoj. Dezirinde estas, ke oni pliampleksigu la nombron de la plenumataj versaĵoj de Botev kaj de aliaj bulgaraj revoluciaj poetoj. Fine la ĵurio motivis siajn pritaksojn pri la apartaj individuaj kaj grupaj plenumantoj kaj artkolektivoj.

Indas menciigi la partoprenon en la Recitalo de la profesiaj aktoroj el la Leningrada Esperanto-Teatro Genadij Rudenko kaj Aleksandr Iovlev, kiuj recitis Botev-poeziaĵojn kaj prezentis scenon el la teatraĵo „Ruĝo kaj Bruno“ de Ivan Radoev.

La Botev-Recitalo en Vraca, en la antaŭvespero de la 2-a de junio (en kiu tago antaŭ

¹) Ĉorbaĝio — bulgara riĉulo dum la osmana jugo.



Grupo por Arta Parolo ĉe E-societo „Diĉo Petrov“ — Ĉepelare, kun arta gvidantino Nikolina Takova, gajninto de dua premio

107 jaroj la genia poeto, fronte de taĉmento de patriotoj, trafite de malamika kuglo pereis en la Vraca-Balkano) estas bonega ebleco popularigi lian verkaron, lumigi korojn kaj animojn per liaj fajra poezio kaj senmortaj ideoj pri libero kaj socia justeco. Por la bulgara popolo li estas supro de la nacia poezio, mobilizanta ekzemplo kaj eterna fonto de pura inspiro. Sed Botev apartenas ne nur al la bulgara popolo. Li apartenas al la tuta progresema homaro, batalanta por nova vivo, por popola feliĉo.

Devo de la bulgaraj esperantistoj estas ĉiel popularigi la faron, la poezion kaj ideojn de Botev kiel revoluciu, patrioto kaj internaciisto, fari la tradician Botev-Recitalon vera festo por la bulgaraj esperantistoj kaj iliaj multnombraj amikoj el la tuta mondo.

EVGENI GEORGIEV

LA PREMIITOJ EN LA KONKURSO

LA GRANDAN PREMION — laŭreatan diplomon kaj objektan premion de 100 levoj oni aljuĝas al: Grupo por Arta Parolo „Stelet“ — Kjustendil kun artgvidantino Maria Lalova pro la spektaklo „Vivas li, vivas!...“

I. INDIVIDUAJ PLENUMANTOJ

UNUA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta premio de 80 levoj estas aljuĝita al:
Nevjana Krăsteva — Sofio

DUA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta premio de 60 levoj al:
Maria Staneva — Plovdiv
Nicolina Takova — Ĉepelare

TRIA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta premio de 40 levoj al:
Antoaneta Ivanova — v. Pavolĉe, Vraca-distrikto
Grigor Venelinov — v. Blagovo, Mihajlovgrad-distrikto
Rumjana Bogdanova — Orjaĥovo

KVAR PREMIOJN de la Distrikta Komitato pri Pacdefendo — Vraca, oni aljuĝas al:
Genadij Rudenko — Leningrad (USSR) — premio de 50 levoj;
Aleksandr Jovlev — Leningrad (USSR) — premio de 50 levoj;
Vitoslava Mazur — Hoĵuv (Pollando) — premio de 40 levoj;
Stamenka Dimitrova — Botevgrad — premio de 60 levoj

DU PREMIOJN de la Centra Estraro de BEA — Sofio, oni aljuĝas al:
Elena Simeonova — Sofio
Ernan Aliev — Gorna Orjaĥovica

SES PREMIOJ — senpagaj abonoj de revuo „Bulgara Esperantisto“ por 1983 estas aljuĝitaj al:
Venelin Draganov — Vraca

Stefan Todorov — v. Blagovo, Mihajlovgrad-distrikto
Asja Jordanova — Sumen
Sabrie Aliĝova — Kneja
Temenujka Kirilova — Sumen

LIBROJN KIEL PREMION PRO PARTOPRENO EN LA KONKURSO-RECITALO ricevis:

Vitold Mazur — Hoĵuv (Pollando)
Natalija Nikiforova — Leningrad (USSR)
Aleksej Polikin — Leningrad (USSR)
Pavla Jodasova — Prago (Ĉeĥoslovakio)

LITERATURAN ALMANAKON „Okolĉica“ ricevis ĉiuj ceteraj partoprenintoj.


KVIN PREMIOJN de la Distrikta Estraro de BEA — Vraca, oni aljuĝis al:
Dimităr Rajĉev — Gorna Orjaĥoviĉa
Sinka Dimitrova — Ĉepelare
Nadka Daskalova — Ĉepelare
Penka Todorova — Botevgrad
Albena Aleksandrova — Sumen

II. ARTKOLEKTIVOJ

UNUA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta premio de 60 levoj estas aljuĝita al:
Grupo por Arta Parolo ĉe E-societo „Kulturo“ — Plovdiv

DUA PREMIO — laŭreata diplomo kaj objekta premio de 40 levoj al:
Grupo por Arta Parolo ĉe E-societo „Diĉo Petrov“ — Ĉepelare

JURIO: Prezidantino: Angelina Sotirova
Membroj: Kunĉo Vălev
Donĉo Hitrov
Stojan Pavunĉev
Ljubomir Trifonĉovski
Snejina Angelova
k. t. sc. ing. Kiril Velkov



Unua Internacia E-Renkongreso „Humuro kaj Satiro'83“ en Gabrovo

Depost 1965 en urbo Gabrovo ĉiun duan jaron, en majo, okazas unika aranĝo — Tagoj de Humuro kaj Satiro kun multaj prezentaĵoj de bulgaraj kaj eksterlandaj partoprenantoj — kreantoj kaj ŝatantoj de humuraj kaj satiraj verkoj — ŝercoj, anekdotoj, versaĵoj, pentraĵoj kaj grafikaj, filmoj, teatraĵoj. . .

Dum tiuj tagoj Gabrovo estiĝas vera monda ĉefurbo de humuro: procesio de maskitoj, karnavala balo, estradaj prezentaĵoj sub libera ĉielo, humor-satira pentroarta ekspozicio-konkurso, filmfestivalo kaj multaj aliaj amuzaj prezentaĵoj. . .

La ambiciaj gabrovaj esperantistoj decidis ne plu postresti de siaj samurbanoj — enkadre de la ĉi-jaraj Tagoj de Humuro kaj Satiro la Distrikta Estraro de BEA kaj la urba E-societo „Verda Torĉo“ en Gabrovo organizis la

unikan Unuan Internacian Esperantistan Renkontigon „Humuro kaj Satiro'83“.

La 29-an de majo j.k. en la salono de la Stata Pupteatro en Gabrovo kunvenis esperantistoj el la urbo kaj el aliaj loĝlokoj de la lando — partoprenintoj en tiu ĉi originala E-aranĝo. Ĉeestis ankaŭ prof. d-ro Stojan Guĝev — vic-prezidanto de la Akademio de Esperanto, la ĝenerala sekretario de BEA Kunĉo Vălev, la ĉefredaktoroj de revuoj „Paco“ kaj „Bulgara Esperantisto“ — Violin Oljanov kaj Donĉo Hitrov, la aktoroj el la Leningrada E-Teatro Genadij Rudenko — reĝisoro en la Leningrada Dramteatro, Aleksandr Iovlev — reĝisoro en la Leningrada Radio, Natalija Nikiforova — ĵurnalistino kaj administrantino de la Leningrada E-Teatro, Pavla Jodasova — reprezentantino de la Ĉefa Esperanto-Asocio, Miĥail Ĉobanov el la Bulgara E-Teatro, la direktoro de la Stata Pupteatro en Gabrovo Ivan Kiskinov ka.


La konata E-veterano el Gabrovo Neno Jancev prezentis la gastojn kaj per varma salutparolo malfermis tiun ĉi unikan E-aranĝon.

En la nomo de CE de BEA salutparolis Kunĉo Vălev.

Nikola Poparov, prezidanto de DE de BEA en Gabrovo, sin turnis al partoprenantoj kaj gastoj per jenaj vortoj:

„Por ni, gabrovanoj, oni rakontas multajn ŝercojn kaj anekdotojn en la tuta lando kaj eĉ eksterlande. Ni estas fame konataj pro nia ŝparemo kaj profitejo, sed kion fari? Tiel instruis nin la vivkondiĉoj: la regiono de Gabrovo estis malriĉa, la grundo ne estas fruktodona. Dum jarcentoj gabrovanoj perlaboris sian panon en senlaca batalo kontraŭ la mizerro. Ili estis devigitaj kalkuli kaj ŝpari ĉiun groŝon. Sparemo kaj kalkulemo estas ĉefaj trajtoj de la karaktero de gabrovanoj eĉ nuntempe, kiam ili ĝuas abundan kaj riĉan vivon. Sed gabrovanoj ne estas nur ŝparemaj kaj profitejoj. Ili estas ankaŭ laboremaj, obstinaj, spritaj, gajaj kaj gastamaj! . .

La esperantistoj el Gabrovo estos feliĉaj,



Nikola Poparov — prezidanto de DE de BEA



Genadij Rudenko kaj Aleksandr Iovlev el la Leningrada E-Teatro prezentas ŝercajn scenojn el la vivo de gabrovanoj

se niaj gastoj agrable pasigos sian tempon en nia urbo dum la tagoj de humuro kaj satiro. Goju kaj ridu kun ni, kun ĉiuj gabrovanoj, kun nia gastama bulgara popolo!"

Kaj ĉiuj vere ĝoje kaj agrable pasigis sian tempon dum la restado en Gabrovo! Ilin ĉie akompanis la devizo de la renkontiĝo: „La mondo ĝisvivis, ĉar ĝi ĉiam ridis!...“

La unua programero apartenis al la geaktoj el la Stata Pupteatro en Gabrovo, kiuj prezentis la ĉarman, gajan kaj spritan pupteatraĵon „Pri kateto, pri steleto kaj pri io alia...“ sub la arta gvidado

de la reĝisoro Nikolaj Kolev. Kiel sciante, per tiu ĉi teatraĵo ili gajnis ne nur la Grandan Premion de „Humuro kaj Satiro'83“ en Gabrovo, sed ankoraŭ ses aliajn premiojn de la Festivalo de Esperantaj Pupteatroj en Zagreb pasintjare. Bonega enscenigo, bonega gvidado de la pupoj, perfekta E-traduko kaj prononcado! La tempestaj aplaŭdoj de la publiko estis vere merititaj!...

Niaj gastoj el Sovetunio prezentis varian programon el gabrovaj ŝercoj kaj anekdotoj en Esperanto kaj kantis ruslingve gajajn ŝercajn rusajn kaj sovetiajn popolkantojn — „ĉastuŝki“. Pri la jarcenta nerompebla bulgara-rusa amikeco kaj frateco kantis kaj ludis niaj karaj gastoj, promesante denove partopreni la sekvan E-renkontiĝon en Gabrovo. La ĉeestantoj vigle aplaŭdis ilian majstrecon.

Mihail Ĉobanov kaj Kunĉo Vălev plenumis ŝercajn versaĵojn kaj humurajn rakontojn de bulgaraj rakontoj, per kiuj pliriĉigis la programon.

Kvankam relative modesta laŭ programeroj, tiu ĉi unua aranĝo jam estas enskribita en la tagjurnalono de la ĉi-jara tradicia Dekado de la Humuro kaj Satiro en Gabrovo, altiras la atenton de la publiko kaj estas kuraĝiga komenco de novaj, pli enhavoriĉaj internaciaj prezentaĵoj.

La iniciato de niaj amikoj el Gabrovo estas laŭdinda kaj devas esti ĉiuflanke subtenata fare de la bulgaraj esperantistoj, por ke ĝi estigu vere internacia, originala esperantista aranĝo.

Bonŝancon, iniciatemaj gabrovaj amikoj-esperantistoj!

Gabrovo — Sofio
majo 1983

[D. SIMEONOV



Partoprenintoj en la solena malfermo de „Gabrovo'83“

(PETĀR TOSKOV — la unua esperantisto kaj socialisto en Batak kaj la regiono)



Petăr Toškov — komandanto de partizantaĉmento en septembro 1923

La 7-an de julio 1878, en la malriĉa familio de Veljo Toškov, loĝanto de vilaĝo Batak¹, naskiĝis filo — Petăr, la unua inter kvin infanoj (kvar knaboj kaj unu knabino).

Petăr estis bona lernanto, sed, estante nur 11-jara, lia patro mortis kaj li, kiel plej aĝa filo en la familio, devis forlasi la lernejon kaj labori por helpi al sia patrino. Petăr estiĝis arbarlaboristo. Sed lia sciemo estis granda kaj li aŭtodidakte plivastigis siajn sciojn. Li ŝatis pentri, interesiĝis pri poezio, mem provis verki versaĵojn, sendis informojn al la demokratiaj ĵurnaloj.

En 1895 li aĉetis librojn de veturanta librovendisto. Inter ili — la verkon de Dimităr Blagoev „Kio estas socialismo kaj ĉu ĝi havas grundon en Bulgario“ kaj ankaŭ alian libron — „Pri la internacia lingvo Esperanto“. Traleginte ilin, la scivolema junulo arde akceptis kaj la ideojn de socialismo, kaj la ideon pri in-


ternacia lingvo. Li estiĝis la unua esperantisto kaj la unua socialisto en Batak kaj en la tuta regiono de Rodopi-montaro. Por noti tiun fakton, la kontraŭuloj de la progreso en la vilaĝo nomis lin „alaŭdo“ — kromnomo, pri kiu li ĉiam fieris.

Li komencis fervore lerni Esperanton kaj samtempe pristudi la ideojn de socialismo. En 1896 li komencis gvidi „klerigajn kursojn“ pri socialismo“ kaj lia domo estiĝis socialista kaj esperantista klubo. Tiamaniere Petăr Toškov estiĝis la vivanta ligo inter la batalantoj de la malnova generacio en 1876 kaj la generacio, kiu portis kiel torĉo la ideojn de la komunista partio kaj pasis tra la flamoj de la ribela 1923 kaj tra la kontraŭfaŝisma batalo 1941—1944.

Laŭ la instrukcioj de Dimităr Blagoev, en 1900 li fondis en Batak la unuan oficialan socialistan grupon. Ĝin partoprenis 16 personoj. La sekvantan jaron en Sofio li interkonatiĝis kun Georgi Kirkov, Gavril Genov kaj Georgi Dimitrov, kun kiuj poste li korespondis. Lia korespondado kun la fama socialisto Jules Guesde (Jul Ged) estis en Esperanto.

Dum tiu sama periodo Petăr Toškov gvidis ankaŭ kursojn de Esperanto. La esperantista societo estis inter la plej aktivaj en la lando. En 1909 li kaj alia loĝanto de Batak — Petăr Fitkin, partoprenis la Unuan Kongreson de la esperantistoj en Rumanio. Tie okazis io kurioza. Li estis inter la 60 kongresanoj, elektitaj ĉeesti la akcepton de la rumana reĝino Elisaveta, konata sub la nomo Karmen Silva. Ŝi estis fama kiel poetino kaj, ĉar ŝi mem estis esperantistino, favore rilatis al la kongreso. Al ĉiu el siaj gastoj Ŝi dediĉis unu-du minutojn por interparolo, sed kun Petăr Toškov, filo de la historia Batak — ŝi interparolis duonhoron. La sekvan tagon la rumanaĵ ĵurnalistoj aperigis foton de Petăr Toškov kaj per grandaj titoloj informis pri lia interparolo kun la reĝino. Nun tiu foto estas eksponaĵo en la muzeo de Batak.

¹ Batak — bulgara urbo (en la supre menciita periodo ĝi estis vilaĝo), situanta en Rodopi-montaro. En 1876, dum la Aprila Ribelo kontraŭ la osmana jugo, ĝi estis bruligita kaj plene ruinigita kaj la plimulto de ĝia loĝantaro — kruele mortigita.



Petâr Toškov kun siaj kunbatalantoj el Batak

En la militoj 1912—1918 pereas la plimulto de la socialistoj el Batak. Tial Petâr Toškov komencas denove semi la socialismajn ideojn kaj, laŭ iniciato de lia samideano Stefan Bojkov, ili ambaŭ baldaŭ restarigis la partian organizaĵojn en Batak.

Dum la unua kontraŭfaŝista ribelo en 1923

la komunistoj, kiuj ne estis arestitaj, restis en la arbaro, formis ribeltaĉmenton kaj elektis la plej malnovan revoluciulon — Petâr Toškov — kiel sian komandanton.

En la jaroj 1924—1925 la progresemluloj en Batak amase lernas Esperanton. Instruas al ili Petâr Toškov, kiu gajnis ilin ankaŭ por la ideoj de socialismo. Inter la plej talentaj esperantistoj kaj revoluciuloj en tiu periodo estis Angel Ĉauŝev, Nikola Ĉolakov kaj Petâr Janev (nun profesoro), kiuj en 1928 fondis lokan organizaĵon en la Laborista Partio en Batak.

Ankaŭ en la periodo de la kontraŭfaŝista batalo dum la Dua Mondmilito Petâr Toškov ĉiam ligis sian revolucionan laboron kun la Esperanto-laboro. Pri tio atestas la fakto, ke en la biblioteko de partizantaĉmento „Anton Ivanov“, konservata en la Nacia Muzeo de la Revolucia Movado, troviĝas gramatiko de Esperanto kaj aliaj Esperanto-lerniloj, liveritaj al la partizanoj de Petâr Toškov kaj de lia filo Krum.

Dum sia tuta vivo Petâr Toškov estis aktiva esperantisto kaj havis korespond-amikojn en la tuta mondo. En Batak al li gastis tiaj famaj esperantistoj kiel profesoro Ihas el Budapeŝto, Marta Rut el Usono, Ivo Lapenna el Jugoslavio, Ivan Krâstanov. (ano de la Esperanto-Akademio) k.a.

La arkivo de Petâr Toškov ankoraŭ ne estas bone pristudita. La pliparto de ĝi estas ĉe lia nepo Angel Kânev (filo de lia plej aĝa filino). Ĉe lia filo Angel, loĝanta en Sofio, estas foto de Petâr Toškov de 1911 kaj 54 leteroj de la periodo 1909—1920; el Belgio, Italio, Pollando, Portugalio, Rumanio, Rusio, Usono, Hungario, Francio kaj Ĉeĥoslovakio.

La vivo de la unua esperantisto kaj socialisto en Rodopi-montaro ĉesis la 30-an de marto 1957 en urbo Batak.

PETKO ARNAUDOV

VELBOATO „ESPERANTO“

Antaŭ kelkaj jaroj mi feris en la pitoreska marurbeto Sozopol. Iun tagon, malfrue posttagmeze, mi estis revenanta hejmen de la strando.

Marŝante malrapide laŭ la kajo de la malgrada haveno, kie unu apud la alia estis ankritaj la velboatoj de la fiŝistoj, mi subite rimarkis sur unu el ili la surskribon „Esperanto“. Sur ĝia masto flirtadis flageto kun kvinpinta verda stelo.

— Ha! Jen surprizo! — diris mi laŭvoĉe.

En la apuda velboato sidis maljuna fiŝisto, kiu okupigis pri sia fiŝreto. Mi demandis lin pri la nomo, kaj adreso de l'posedanto de la verdstela boato.

— Tiu ĉi boato apartenas al baj Dimitâr Vasilev — la esperantisto. Jen estas lia domo! — kaj la maljunulo montris al mi grandan novan domon sur la alta marbordo, tute proksime de la kajo.

Mi premis la sonorilon kaj post kelkaj minutoj ĉe la

pordo aperis maljuna viro kun sunbrunigita vizaĝo, en okulvitroj, tra kiuj li atente ekrigardis min.

— Bonan tagon! — mi salutis lin en Esperanto. — Ĉu vi estis baj Dimitâr?

— Jes, mi estas — li respondis ridetante. — Kaj vi kiu estas?

— Mi estas ferianto. Vidinte la verdstelan flageton sur la masto de via velboato, mi ekdeziris konatiĝi kun vi.

— Bonvolu! — li vaste malfermis la pordon kaj invitis min eniri.

Dum kelkaj horoj ni sidis kaj interparolis en Esperanto. Jam estis malfrua vespero, kiam mi forlasis lian gastaman domon, promesinte al li denove viziti lin dum mia restado en Sozopol.

Tiel komencigis mia longjara konateco kaj amikeco kun baj Dimitâr. . .

Mi deziras rakonti kelkajn momentojn el lia biografio, ligitajn kun lia esperanta agado kaj kun lia partopreno en la Septembra Ribelo 1923 — la unua kontraŭfaŝista ribelo en la mondo.

Dimităr Vasilev Tomov el la malnova urbeto Sozopol naskiĝis en 1905 en la familio de malriĉa forĝisto — hufferisto. Li havis tri fratojn kaj tri fratinojn. Dum la Balkana Milito kaj la Unua Mondmilito lia patro soldatservis kaj estis sur la fronto. La familio vivis en mizero. La infanoj vizitis lernejon kaj samtempe laboris por vivteni sin.

Post la militoj Dimităr, jam fininte la antaŭgimnazian kurson en la lernejo, komencas labori kiel kudrista metilernanto en la distrikta urbo Burgas. Li estiĝas organizita membro de la Sindikato de Kudristoj kaj en 1921 partoprenas la strikon de kudristoj, kiu daŭras 45 tagojn. Kvankam finiginte senrezulte, la striko montras al la burgaj aŭtoritatoj, ke la laboristoj estas decidoplenaj firme batali por siaj rajtoj kaj por plibonigo de siaj vivkondiĉoj. Intertempe Dimităr amikiĝas kun multaj kolegoj-kudristoj kaj kun aliaj laboristoj en Burgas, aktive partoprenas la iniciatojn de la sindikataj organizaĵoj. En februaro 1922 li eniras la vicojn de la Komunista Junulara Unuiĝo (Komsomolo) kaj regule vizitas ĝiajn kunvenojn. Dum tiu periodo Dimităr estas tre agema aktivulo de la Komsomolo, partoprenas la organizaĵon kaj efektivigon de Unuamajaj manifestacioj de laboristoj, mitingojn de la Komunista Partio.

Post la faŝista puĉo la 9-an de junio 1923, la partia dekopo, en kiu membris Dimităr, kolektiĝis en la domo de la instruisto Maksimov, por pritaksi la situacion kaj por preni decidon pri reago. Ĉar intertempe de ĈK de la partio ne venis ia ajn instrukcio, la dekopo frumatene de la sekva tago forlasis la domon de Maksimov kaj disiris al siaj hejmoj. Sed Dimităr Vasilev estis arestita de iu sekreta agente kaj kondukita en la policejon. Nur la hazarda konateco kun la poliestro savis lin.

Komenciĝas preparlaboroj por kontraŭfaŝisma ribelo. La polico furiozas kaj ĉiunokte policanoj kondukas arestitajn komunistojn en la kazernojn. En la antaŭvespero de la ribelo partianoj kaj komsomolanoj estas kolektiĝintaj en la domo de la partia funkciulo Georgi Marĉev, atendante signalon por komenco de la ribelo. Ĉiuj estas armitaj kaj ilia tasko estas okupi la policejon. Tamen la tutan nokton ili ne rimarkas la interkonsentitan signalon — bruligitan fajron sur la monteto Karabair, kiu signifus, ke la ribelintaj kamparanoj el la apudaj vilaĝoj alvenas. Noktomeze ili ekzidis pafojn, dume la urba anoncisto tamburis, alvokante la faŝistojn kaj la blankgvardianojn¹

iri en la kazernojn kaj sin armi por kontraŭstari al la ribeluloj. La armitaj kamparanoj, kiuj intertempe atingis la urbon, komencas furiozan pafadon kontraŭ la ĝendarmoj kaj la alvenintaj soldatoj, sed baldaŭ estas devigitaj retiriĝi, lasante sur la batalkampo multajn mortigitojn. . .

Dimităr Vasilev kaj kelkaj liaj kamaradoj ŝanĝas loĝejon post loĝejo, serĉataj obstine de la policanoj, sed finfine, konvinkinte la kaptanon de iu turka boato helpi ilin, ili sukcesas atingi Sozopolon, kie dum longa tempo sin kaŝas de siaj persekutantoj. Iliaj loĝejoj en Burgas estis traserĉitaj fare de agentoj de la polico, kiuj tamen trovis nenion suspektindan. Malgraŭ tio multaj el la kamaradoj de Dimităr Vasilev estis arestitaj kaj mortpafitaj kiel partoprenintoj en la kontraŭfaŝisma ribelo.

La situacio iom post iom kvietiga. La pistolo kaj la ruĝa ribelula rubando estas zorgeme kaŝitaj en la fundamentoj de la domo de Dimităr Vasilev en Sozopol. Li komencas labori kiel kudristo. Samtempe li komencas lerni Esperanton kaj pere de sia aktivado en la Societo de Abstinenculoj en la urbo li daŭrigas sian kontraŭfaŝisman agadon. Li jam havas multajn korespondantojn el diversaj landoj kaj iuj el ili gastas al li somere. Germanaj esperantistoj informas lin pri la faŝisma proceso en Lejpeco 1933 kontraŭ la elstara komunisto-internaciisto kaj pacbatalanto Georgi Dimitrov kaj liaj kamaradoj.

Dimităr Vasilev estas unu el la fondintoj de la Societo de Abstinenculoj en Sozopol. Li aranĝas kultur-muzikajn vesperojn, gvidas ĥoron, organizas ekskursojn kaj neniam forgesas pri Esperanto. Laŭ lia instigo membroj de la E-societo de Abstinenculoj estiĝas multaj progresemaĵoj junuloj.

Dum la jaroj de faŝisma reĝimo la polico konstante observas kaj kontrolas la agadon de Dimităr Vasilev.

En septembro 1944 la Ruĝa Armeo proksimiĝas al la bulgara landlimo. La 8-an de septembro Dimităr Vasilev kaj liaj kamaradoj-komunistoj sin preparas por la lasta batalo kontraŭ la faŝistoj. La 9-an de septembro 1944 la regpotenco jam estas en la manoj de la venkintaj kontraŭfaŝistoj. La Komitato de la Patrolanda Fronto komisiis al Dimităr Vasilev estri la poŝtejon. Oni fondas la unuan post la socialisma revolucio Popolan Konsilantaron en Sozopol, kies membro estas ankaŭ Dimităr Vasilev. Krome, li estas respondeculo de la Komisiono pri Popola Sanprotektado. Pri malfrue, kiel ĉefkontisto de la novefondita Labor-produktada Kooperativo, li laboras ĝis sia emeritiĝo.

Nun la domo de Dimităr Vasilev sur str. „Tjulen“ 5 estas ĉiam gastame malfermita por gesamideanoj el ĉiuj partoj de la Tero.

¹ Blankgvardianoj — personoj, kiuj militis kontraŭ la sovetia ŝtato (elmigrintaj en Bulgarijon kaj en aliaj landoj post la venko de la Oktobra Revolucio) — Noto de la Red.

Ĉe granita pecego
sono post sono
ili nombris
en nedefenditaj brustoj
minutojn siajn lastajn —
viroj
de neniu alia
viditaj,
nek aŭditaj,
nek priploritaj.

Ili — la sep
mizianoj.
Ili — la sep
dronintaj
en la polvo stela
de l'nokto
septembruloj.

Pli ruiniga eĉ ol eksplodo —
doloro el ĝemoj
fendis
la rokon — ĉe l'voj' elkreskintan.
Kaj malfermigis jen vundoj
sur korpo ĝia — kvazaŭ sur viva
estaĵo.

La roko

Ivan Rudnikov

Kaj ĝi estiĝis
fonto de dolor' senvoĉa.

Antaŭ la sep
mizianoj.
Antaŭ la sep —
dronintaj
en la polvo stela
de l'nokto
septembruloj.

Ekde tiam
en ĉagren', sen espero,
sur vangoj ĝiaj, pro doloro koroditaj,
guto post guto —
el la okuloj
de ĝiaj fendaĵoj
malrapide elfluas
malĝojo
en larmoj.

Por la sep
mizianoj.
Por la sep
dronintaj
en la polvo stela
de l'nokto
septembruloj.

La aliaj —
sur la vizaĝoj
kun masko malvarme-mortiga,
kun mort' senindulga en manoj,
ne komprenis:
ke nura
en tiu mallum' inter vivaj
la roko
ja estis
kun koro.

Al la sep
mizianoj.
Al la sep —
dronintaj
en la polvo stela
de l'nokto
septembruloj. . .

Tradukis: DIMITAR DENČEV

JUBILEO DE LA BULGARA E-MUZEO

Kiel oni venis al la ideo pri fondo de Bulgara Esperanto-Muzeo?

En n-ro 2/1960 de „Bulteno de Bulgara Esperantista Kooperativo“ aperis artikolo de Georgi Trajanov sub titolo „Biblioteko-muzeo“. En tiu artikolo la aŭtoro alvokis al kreo de granda, bone organizita biblioteko, en kiu trovus lokon ne nur ĉiuj E-materialoj, aperintaj kaj aperantaj en Bulgario, sed ankaŭ multaj valoraj libroj kaj periodaĵoj el eksterlando.

Interesite de tiu ĉi artikolo, d-ro Boris Nedkov, post kontaktoj kun s-ro Hugo Steiner, fondinto de la Internacia E-muzeo en Vieno, prenis sur sin la taskon realigi tiun ĉi ideon. Kiel fondinto de la Bulgara E-Muzeo, li estas ankaŭ la unua donacinto — liaj propraj libroj kaj periodaĵoj estis la bazo de la muzea fonduso. Dum pluraj jaroj la materialoj estis konservataj en lia propra domo.

La naskiĝdato de la muzeo estas la 1-a de aprilo 1963. Ĝia regula funkciado tamen komenĝis nur en januaro 1982, kiam estis oficigita organizanto de la muzeo kaj estis elektita Muzea Konsilantaro, kies tasko estas gvidi, kontroli kaj akordigi la agadon de la muzeo.

Nun, post dudek jaroj, oni facile povas konstati, ke dum tiu periodo estis kolektitaj multaj valoraj dokumentoj, libroj kaj periodaĵoj. Ni menciuj nur iujn malnovajn revuojn: „Lumo“, „Radio“, „Danubo“, „Semo“, Oficiala Gazeto Esperantista, „Revuo Orienta“, „L' Esperantiste“, „La du steloj“ kaj ankaŭ la bibliografiajn raraĵojn „Internacia veterinara

revuo“, „La liro de la esperantistoj“, Nurnberg, 1893 de A. Grabowski kaj „La neĝa blovado“, Varsovio 1888, de A. S. Puŝkin.

La muzeo havas kiel sian plej gravan taskon: kolekti kaj konservi valorajn E-eldonaĵojn kaj arkivojn el la pasinteco; kolekti kaj konservi ĉiujn E-materialojn, eldonitajn en Bulgario; interŝangi librojn kaj periodaĵojn kun alilandaj bibliotekoj, muzeoj, societoj aŭ unuopaj esperantistoj; eltrovi kaj kolekti ĉiujn materialojn pri Esperanto kaj pri la E-movado en neesperantaj bulgaraj eldonaĵoj; eltrovi publikaĵojn pri Bulgario kaj la bulgara E-movado, aperintajn en alilandaj E-periodaĵoj; interŝangi bibliografiajn informojn pri E-eldonaĵoj; per ekspozicioj (ĉe konvenaj okazoj) propagandi la multjarajn tradiciojn de la bulgara E-movado, ĝiajn sukcesojn kaj atingojn; kolekti kaj konservi fotojn pri E-eventoj — bulgaraj kaj internaciaj (kun bulgara partopreno).

La Bulgara Esperanto-Muzeo subtenas liajn kun la Oficiala E-fondaĵo C. Vanbiervliet ĉe la urba publika biblioteko en Kortrijk, Belgio; kun Hispana Esperanto-Muzeo de s-ro Hernandez Yzal, kun s-ro Fajsz Karoly el la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Antaŭ nelonge ni ricevis la donacitaĵojn de s-ro Cesar

Vanbiervliet malnovajn jarkolektojn de „Brita Esperantisto“; Katalogo de la E-gazetaro, 1934, donacita de s-ro Fajzsi Karoly, la libro „Esperanto en la moderna vivo“, donacita de Chuck Carson el Kanado. Ni esperas, ke post nelonge ni sukcese plilarĝigos niajn kontaktojn por interŝanĝo de libroj kaj periodaĵoj kun ĉiuj interesigantoj.

Por la agado de la muzeo povus grave kontribui ĉiuj esperantistoj, precipe la malnovaj esperantistoj-veteranoj. Ĝis nun pli ol 50 personoj donacis al la muzeo materialojn el siaj kolektoj. Nur en 1982 donacojn faris: Canko Murgin, Turista Sekcio ĉe BEA, Kunĉo Vălev, Nikola Aleksiev, Ĥristo Gorov, Boris Popov, Simeon Simeonov, Miĥail Elenov, d-ro Boris Nedkov, Marin Marinov, Urba Estraro de BEA — Sofio, Violin Oljanov, Nano Nanov, Dimităr Ivanov, Minko Conkovski, Fervojista Sekcio ĉe BEA, Meleŝko Ŝiŝkov, Asen Josifov, Tinka Lakova, Anton Genov, Antoaneta Atanasova, Angel Todorov, Krăstju Karucin. Inter la junaj esperantistoj ankaŭ estas videbla strebado kontribui por pliriĉigo de la muzeo. Ekzemplon de tia rilato donis Rajniĉka Kalojanova kaj Lilia Stanĉeva.

Apartan dankon ni esprimas al k-do Asen Grigorov, kiu donacis al la muzeo sian tutan

bibliotekon (libroj, revuoj kaj arkivaj materialoj).

Rezulte de tiu ĉi kolekta agado en la momento la muzeo posedas (escepte de la nepriboritaj materialoj en Pisanica): ĉirkaŭ 1000 librojn; ĉirkaŭ 500 titolojn de gazetoj kaj revuoj (inkluzive 400 plenajn jarkolektojn, el ili 337 binditaj). Krome, en sia kolekto la muzeo havas afiŝojn, insignojn, fotojn, prospektojn ktp.

Por la Muzeo estas tre valoraj ankaŭ la rememoroj de niaj veteranoj, kiujn ni danke akceptus.

Ĝis nun estas verkitaj 8 biografiaj artikoloj pri la patronoj de la novefonditaj E-societoj en la ĉefurbo kaj 4 bibliografiaj informoj. Krome, pere de la distriktaj bibliotekoj, la muzeo ricevis 11 bibliografiajn informojn pri la apero de poresperantaj materialoj en la provinca gazetaro.

Ni esperas, ke dum 1983 — la jubilea jaro de Bulgara Esperanto-Muzeo, pli multaj kompetentaj personoj pensos kaj agos por la konservado de valoraj E-materialoj por la estonto.

Ni apelacias al ĉiuj bonvolaj gesamideanoj. en nia lando kaj en eksterlando subteni laŭeble nian agadon.

PAULINA LAZAROVA

EKSPOZICIO EN PRIVATA DOMO

La E-societo en Kazanlâk estas fondita en 1902. Plej multjara kaj aktiva ĝia prezidanto estis Dimo Martinov — de 1957 ĝis 1976. Post sia pensiĝo Martinov transloĝiĝis en sian naskiĝvilaĝon Krân (distrikto de Stara Zagora), kie li plu laboras por „Esperanto. De multaj jaroj lia ŝatokupo estas la kolektado de diverspecaj E-materialoj, per kiuj li aranĝis ekspozicion en unu el la ĉambroj de sia domo.

Sur tri tabuloj estas fiksitaj gazet-eltranĉaĵoj de artikoloj kaj korespondaĵoj pri E-aktivecoj en Kazanlâk, presitaj en ĵ. „Rabotniĉesko Delo“, ĵ. „Iskra“, revuo „Bulgara Esperantisto“ k.a. Estas tabulo kun fotoj el la vivo de la E-societo en Kazanlâk. Plej malnova estas la foto de la societaj fondintoj, estas ankaŭ fotografaĵo de la unua E-ekspozicio, aranĝita en legejo „Iskra“ (Fajerero) en 1926, fotoj de gekursanoj kaj kursgvidantoj de E-kursoj, de partoprenintoj en VIII Junulara E-Festivalo en Kazanlâk en 1967. Du tabuloj estas „bunti-

gitaj“ per ilustritaj bildkartoj, senditaj de esperantistoj el diversaj landoj.

En albumo estas konservitaj fotoj de esperantistoj el Kazanlâk kaj ties ĉirkaŭaĵo, pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo — P. Jankov, Cyjatko Radojnov, Bonĉo Sanov, K. Kunev k.a., kaj ankaŭ fotoj de vivantaj partoprenintoj en la rezista movado.

En la privata kolekto oni povas trovi tradukitajn kaj originalajn E-librojn — „Sub la jugo“ de Iv. Vazov, „Bopatrino“ de G. Karaslavov, la poemkolekton de N. J. Vapcarov. Elmontritaj estas ankaŭ jarlibroj de Universala E-Asocio, jarkolektoj de revuoj kaj ĵurnaloj, lernolibroj, vortaroj k.a. literaturaĵoj.

Dimo Martinov plu riĉigas tiun interesan E-ekspozicion. Li ankaŭ verkas la historion de Esperanto en Kazanlâk kaj ĝia regiono.

TODOR IVANOV

PER ESPERANTO TRA BULGARIO

Mi havis la bonan okazon viziti Bulgarian. Sub la sperta gvidado de mia amiko Petko Bonev el Stara Zagora mi vizitis multajn urbojn: Sofio, Pazarĝik, Plovdiv, Smoljan, Stara Zagora, Kazanlâk, Gabrovo, V. Târnovo, Varna, k. a. Ni surgrimpis ankaŭ Vitoŝa-monton, montopintojn Snejanka kaj Buzluĝa.

Unue ni vizitis la vidindaĵojn de la moderna socialisma ĉefurbo Sofio.

Mi vizitis la historian kaj fame konatan Rila-monaĥejon — fokuson de la bulgara patriotismo kaj rimarkindan monumenton de la Bulgara Renesanco.

En urbo Pazarĝik nin akceptis s-ro Petko Arnaudov kun sia edzino Ljudmila. Samtempe al s-no Arnaudov gastis sesnombra Esperanta familio el Francio. Do, la manĝotablo havis vere internacian aspekton.

En Pazarĝik ni vizitis vere interesan etnografian ekspozicion. La prelegoj kaj la klarigoj pri la eksponaĵoj estas en 6 lingvoj, inter ili Esperanto.

Kune kun la franca familio ni vizitis Agran-Industrian, Komplekson. Ĝi konsistas el 17 vilaĝoj kune kun la norda parto de urbo Pazarĝik. La kooperativo unuigas ĉirkaŭ 7000 familiojn. Ĉiu familio posedas en sia korto

hejmajn birdojn (kokojn, anserojn, meleagrojn kaj kelkaj ankaŭ kuniklojn). Ĉiu familio bredas en sia korto almenaŭ po unu porkon por propraj bezonoj. La laboro en la rizkampoj kaj en la brutbredejo estas mekanikigita.

En Pazarĝik ni vizitis interesan preĝejon — eble unika en Eŭropo per siaj lignogravuraĵoj. Ni ankaŭ estis sur strato „Esperanto“.

La esperantistoj el Pazarĝik rakontis al mi, ke per propraj monrimedoj ili bredis dombestojn, vendis ilin kaj konstruis tre belan klubejon. Ĉiuvespere la klubejo estas malfermita por kursoj, amikaj renkontoj kaj konversacioj.

En Rodopi-montaro ni vizitis la distriktan centron — urbon Smoljan kaj la situantan en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj imponan konstruaĵon de la „Internacia Esperanto-Kursejo“. En la kursejo gastis multaj bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj. Hungaraj kaj polaj esperantistoj prezentis belartajn programojn. Ankaŭ ni ludis kaj kantis kune kun ili. Ĉiuj tre amike akceptis nin. Neforgeseblaj estos la vesperoj en la Esperanto-domo!...

En Stara Zagora mi gastis en la familio de s-ro Bonev, kiu amike akceptis min. Dum mia restado mi vizitis fabrikojn, mineralbanejojn, ripozdomojn por laboristoj kaj la historiajn monumentojn „Buzluĝa“ kaj „Ŝipka“.

Ni vizitis ankaŭ la interesajn urbojn Gabrovo kaj Veliko Târnovo. En Gabrovo ni vidis muzeon de la disvolviĝo de bulgara industrio kaj metioj kaj la unikan en la mondo Domon de Humuro kaj Satiro.


Veliko Târnovo estas ĉefurbo de la Dua Bulgara Regno (1185—1393). La amfiteatre situantaj pitoreskaj domoj speguliĝas en la akvoj de rivero Jantra.

En Varna gastame akceptis nin la familio de s-ro Bonjo Bonev — frato de mia kunvojaĝanto.

Varna estas la plej granda mara haveno, marborda kaj bankuraca ripozloko, nomata „somera ĉefurbo de la bulgaroj“. La maraj strandoj estas kun orkolora sablo.

En Varna mi vizitis grandan fabrikon por produktado de vino. La fabriko produktas 17 diversspecajn vinojn kaj multajn likvorojn. Min akceptis ankaŭ la direktoro. Mi gustumis. La fabriko eksportas 80% de sia produktado, inkluzive en Japanion.

Mi vizitis ankaŭ kelkajn lernejojn, eĉ havis la okazon pridiskuti instruan laboron. Dek-unujara lernado estas deviga. Lernado en ele-



S-ro Keiĉi Sasamori el Japanio en amika interparolo kun Donĉo Hltrov — ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“

mentaj, mezaj fakaj lernejoj kaj en universitatoj estas senpaga.

En Sofio nin akceptis s-ro Gorov — prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio kaj s-ro Aleksiev — honora prezidanto de MEM (Mondpaca Esperantista-Movado).

En diversaj urboj nin akceptis aŭtoritatoj, kiuj afable respondis al multaj miaj demandoj.

Mi havis ankaŭ la okazon viziti kelkajn geedziĝfestojn, vidi belajn popoldancojn kaj aŭskulti popolkantojn.

Mi konstatis, ke la bulgara popolo estas amika kaj pacama. Ĝi vivas en kontento kaj ĝojo, ĝi malamas la militon kaj aktive kontraŭstaras la atomarmilojn.

Sofio — Tokio,
1982

KEIICHI SASAMORI

LA E-INSTRUADO — NEPRE REORGANIZENDA!

Ĉiujare en multaj landoj oni „produktas“ multnombrajn novajn esperantistojn, la plejparto el kiuj defalas kaj neniam fariĝas „samideanoj“. Tio okazas ĉie, kie oni instruas Esperanton laŭ la ĝisnuna maniero. Ja ni esperantistoj fervore propagandas, ke Esperanto estas la plej facila lingvo, ekposedota eĉ sen laboro, nur post kelkfoja trafaliumo de la lernolibro aŭ per aŭskulto de kelkaj lecionoj, (t.e. sen sufiĉa lingva praktiko!) kaj ĝin oni povus ellerni — kia miraklo! — dum tre mallonga tempo: nur tri-kvar monatoj sufiĉus!

Ĉu ĉi tio estas vero? Jes, Esperanto estas facila lingvo! Jes, ĝi estas pli facila ol kiu ajn nacia lingvo! Tamen ĉu sufiĉas tri-kvar monatoj, por akiri la necesan sperton kaj lertecon por uzi senĝene, senerare kaj flue la lingvon? Kial do ni devas aserti, ke tiu tempo sufiĉas, se ni ĉiujare konstatas, ke la plejparto de la personoj, finintaj la unuagradan E-kurson, ne vizitas duagradan kurson, ne vizitas niajn kunvenojn kaj finfine perdiĝas kiel esperantistoj?! Kial do ni devas rapide instrui la tutan gramatikon kaj kiel eble plej multe da vortoj, nur ĉar la lingvo estas facila? Kial ni devas galopi?! Eĉ la plej facila agado devas esti multfoje kaj longtempe ekzercata (en la sporto — trejnata!), por ke ĝi fariĝu „kutimo“, „lerteco“, „kapablo“. Kaj ĉu la unuagradaj kursanoj sukcesas akiri ilin? Apartaj personoj eble sukcesas, sed la plejparto — ne! Ili preskaŭ ne kuraĝas „malfermi“ sian buŝon ĝis la fino de la kurso. . . Vere, ili komprenas nian parolon, tamen tio estas pasivaj, ne aktivaj konoj. Akiri la kapablon „aktive esprimi“ siajn proprajn pensojn (ĉu skribe aŭ parole), tio estas tute alia afero, kaj por akiri tiun kapablon oni bezonas multe da tempo. . . Nia fame konata majstro de la rekta metodo Andreo Cseh diradis, ke oni ne devas instrui la tutan gramatikon dum la unuagrada kurso, ke oni ne devas doni amason da vortoj dum tiu tempo („La ampleksigo de la vorttrezoro estu tasko de la praktiko!“ — diradis li). Tamen estas „spertuloj“ tiurilate, kiuj asertas, ke pro la facileco de la Internacia Lingvo, ni povas kaj devas instrui

en unuagrada kurso **minimуме 500 radikojn!**

Evidentiĝas, ke la laŭprograma instruado de Esperanto en unuagrada kurso, konsistanta el 64 instruhoroj, **ne sufiĉas!** Ne sufiĉas almenaŭ kiam oni uzas la disponeblajn lernolibrojn (ili estas **nur du** kaj la E-instruanto ne havas eblecon elekti la plej konvenan — ili ambaŭ ne estas sufiĉe bonaj. . .) Se ni volas plu uzi ilin (ĝis kiam aperos aliaj lernolibroj, pli taŭgaj, pli koncizaj, kun malpli da gramatiko kaj leksiko por **unuagradaj** kursoj), ni devas ŝanĝi la instrumanieron: la E-instruado devas esti nepre reorganizita! Por formi kapablojn en la kursanoj, por aŭtomatigi la akiritajn konojn oni devas apliki ilin (ne post la lingva kurso, sed jam **dum la kurso mem**. Oni devas aktualigi la akiritajn novajn lingvajn konojn por formi en la kursanoj kapablon kaj kutimon de senĝena, senerara kaj flua uzado de la lingvo (skribe kaj parole). Alimaniere la lingvaj konoj restos **nur konoj**, ili baldaŭ paliĝos en la cerbo kaj post iom da tempo ne plu estos aplikeblaj. . . Tial forfalas multaj el la finintoj de unuagrada E-kurso!

Kion fari? **La E-instruado nepre devas esti reorganizita!**

Ni ne devas plu propagandi, ke nia lingvo pro sia facileco estas ellernebla dum 3—4 monatoj. Ni devas varbi novajn kursanojn laŭ la maniero de fremdlingva instruado. Eble en ĉiu lando, same kiel en nia lando, la dezirantoj lerni fremdan lingvon vizitadas lingvan kurson dum la tuta lernojaro (do ili havas **tut-jaran unuagradan kurson!**) Sammaniere ni, esperantistoj, devas propagandi kaj varbi kandidatojn por niaj kursoj. Por substreki la facilecon de nia lingvo, ni povus anonci, ke la unuagrada kurso estos ne 8-, sed **nur 6-monata!** Do, ni plilongigus la tempon por studado de la Internacia Lingvo en unuagrada kurso de 3—4 al 6 monatoj! Kaj la aldona gajnita tempo de du monatoj estos tempo por plifirmigo de la akiritaj lingvaj konoj, por formado de kapablo flue kaj senĝene esprimi la proprajn pensojn. Nur tiel ni povus atingi

pli bonajn rezultojn, nur tiel ni sukcesus bone prepari la novajn esperantistojn.

Mi proponas jenan skemon de sesmonata unuagrada E-instruado por civitanoj: **1-a semestro** — novembro, decembro, januaro; de la 23-a ĝis la 27-a de januaro — tutsemajna ĉeesta okupo kun kunloĝado en aparta domo ekster la loĝloko (ripozdomo, montodomo), dum kiu okazu amuzaj vesperoj en Esperanto kun multaj E-kantoj, renkontiĝo kun E-veteranoj (eventuale alilandanoj), kvizoj k.a.; **2-a semestro**: — februaro, marto, aprilo; de la 23-a ĝis la 27-a de aprilo — tutsemajna ĉeesta okupo (vidu supre!) kun porekzamena antaŭpreparo (24-an — 26-an de aprilo) kaj okazigo

de la ekzameno mem (25-an — 27-an de aprilo).

Disdono de la atestiloj okazu solene en la plej proksima tuturba E-kunveno, en ĉeesto de la malnovaj esperantistoj.

Laŭ mia skemo oni bezonos entute 120 instruerojn (44+16) dum la 1-a semestro kaj 46+14 dum la 2-a semestro).

Mi petas la E-instruistojn el la tuta mondo esprimi sian opinion pri la proponita skemo al jena adreso: Bulgario, 1000 Sofio. p. k. 1054, M. Bacev.

MARIN BĂCEV,

Plenkunsido de CE de BEA

La 25-an de majo j. k. en Sofio okazis plenkunsido de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio. Ĉeestis membroj de la distriktaj estraroj, aktivuloj de BEA el la tuta lando kaj ankaŭ reprezentantoj de CK de BKP — Georgi Petrov, Nano Kjuĉukov kaj Violeta Musakova.

La prezidanto de CE de BEA Ĥristo Gorov faris detalan raporton pri la multflanka agado de la asocio dum la periodo 1981—1982. Li emfazis, ke gvidfaktoro de tiu agado estis la decidoj de la historia XII Kongreso de la Bulgara Komunista Partio por plua plibonigo de nia organiza kaj kultur-kleriga aktivado, por efektiva kontribuo al la nacia kulturo, por ĉiam pli energia batalo por paco kaj interkompreniĝo inter la popoloj.

Kun kontenteco la raportinto konstatis la evidentan plibonigon de la laboro de apartaj sekcioj de BEA, pritaksante la personan kontribuon de iliaj gvidantoj kaj aktivuloj. Kuragiĝas estas la rezultoj de la enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en la IX kaj X klasojn de la mezlernejoj en nia lando kaj de la instrulaboro por preparo de novaj E-instruistoj por respondi al la granda interesiĝo pri Esperanto inter la lernantaro.

Ĥristo Gorov speciale substrekiis la humanan aktivadon de la bulgaraj esperantistoj-pacbatantoj, kiuj kolektis pli ol cent mil subskribojn sub la alvoko de la Kvakera E-Societo (KES), por defendo de la paco, kontraŭ la horaraj nukleaj armiloj kaj la minaco de nova monda katastrofo.

La akceptita post viglaj diskutoj Kompleksa Programo por la estonta laboro de BEA dum

1983, 1984 kaj 1985 inkludas multajn gravajn kaj interesajn enlandajn kaj internaciajn aranĝojn: Scienc-Praktika Konferenco lige kun la 60-a datreveno de la Septembra Ribelo 1923; Internacia Renkontiĝo de Esperantistinoj-Aktivulinoj; Internacia Somera E-Universitato (1983), Renkontiĝo de Esperantistoj el la Balkanaj Landoj; Kunsido de Gvidantoj de la E-Unuiĝoj el la Socialismaj Landoj (1984); Internacia Renkontiĝo de Membroj de MEM, dediĉita al la 40-jara datreveno de la venko super la hitler-faŝismo; Internacia Konsiliĝo de Redaktoroj de la E-revuoj en la Socialismaj Landoj por Interŝanĝo de Sperto (1985) kaj multaj aliaj.

Tiu riĉa programo postulas streĉiĝon de la fortoj de ĉiuj membroj de BEA. Ĝia plenumo kontribuos por plua disvastigo de la Internacia Lingvo en nia lando, por plivastigo de niaj amikaj rilatoj kun esperantistoj el la tuta mondo por komuna batalo kontraŭ la militminaco.

La partoprenintoj en la Plenkunsido aproxis du gravajn dokumentojn — la Regularon pri Mastruma Agado de BEA kaj la budĝeton de la asocio por 1983. M. Marinov, prezidanto de LKK de IFEF, informis la ĉeestantojn pri la ĝis nun farita prelaboro kaj pri la antaŭstarantaj taskoj por digna okazigo de la Internacia Kongreso de IFEF en nia lando en 1984.

La plenkunsido aprobis ankaŭ la kandidatecojn pri novaj membroj de la Centra Estraro de BEA.

La akceptita Kompleksa Programo starigas antaŭ la bulgaraj esperantistoj multajn respondecajn kaj gravajn taskojn, kiuj postulas aktivan kaj sindonan laboron.

R. B.

TEATRA VESPERO EN SOFIO

La 1-an de junio ĉi-jare la E-Kulturcentro „M. Gorkij“ en Sofio organizis vesperon, dediĉitan al la Internacia Tago de Infanoj kaj al la Tago de Botev kaj de la Pereintoj en la Batalo kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo.

En la unua parto de la programo sin prezentis la laŭreatino de la „Botev-Recitalo '83“ en Vraca **Nevjana Krăsteva** el Sofio per la premiita versaĵo „Mia preĝo“ de Ĥristo Botev, kaj grupo da lernantoj el 28-a gimnazio en Sofio prezentis sian recitalon pri Botev, kompilitan el Botev-verkoj de la lernantino Elena Simeonova.

La dua parto de la programo estis tre agrabla surprizo por la ĉeestantoj — la aktoroj el la Leningrada E-Teatro Genadij Rudenko kaj Aleksandr Iovlev plenumis fragmentojn el „Ruĝo kaj Bruno“ de Ivan Radoev kaj el „Hamleto“ de Ŝekspiro. Tio estis spektaklo, realigita sen dekoracioj, kostumoj kaj ŝminko, kaj tamen la impresoj estis tre forta, ĉar Rudenko kaj Iovlev sin prezentis ne nur kiel tre bonaj aktoroj, sed ankaŭ proponis al ni la plezuron ĝui perfektan lingvon — pruvo, ke Esperanto estas vivanta lingvo, per nenio cedanta al la „naturaj“ lingvoj. Evidente, la aktoroj-esperantistoj estas tiuj, al kiuj apartenas la nobla tasko prezenti al la mondo la lingvon de Zamenhof en ĝia tuta brilo!

La aktoroj el la Leningrada E-Teatro gastis en nia lando laŭ invito de CE de BEA kaj de DE de BEA en Plovdiv (ĝemela urbo de Leningrad). Ili jam partoprenis la „Botev-Recitalon '83“ en Vraca kaj la unuan E-Renkontiĝon de Humuro kaj Satiro en Gabrovo kaj prezentos sin ankaŭ en Plovdiv, Asenovgrad, Stambolijski kaj Stara Zagora.

Lidia RAEVA

TRIA „SIRINGA VESPERO“ EN LOVEĈ

La 23–24-an de aprilo j. k. la „siringa urbo“ Loveĉ denove proponis sian gastamon al 119 geesperantistoj el la lando, partoprenintoj en la Tria Nacia Esperantista Renkontiĝo „Siringa Vespero“. La atmosfero estis tre agrabla kaj „siringa“: interkona vespero en restoracio meze de florantaj siringoj, promenado en la pitoreska malnova urboparto „Varoŝa“ kaj en la parko „Strateŝ“ inter siringoj, literatura kaj muzika programo, dediĉita al Loveĉ kiel urbo de muziko kaj siringoj. La gastoj aktive partoprenis en la programo el E-versaĵoj kaj -kantoj per la „Mikrofono estas via“.

Estas sciate, ke depost 1982 en la kadro de la „Siringa Vespero“ en nia urbo okazas ankaŭ

Nacia Konkurso de Originala kaj Traduka E-Poezio. La prezidanto de la ĵurio Violin Oljanov el la Centra Estraro de BEA — Sofio, anoncis la rezultojn pri originala poezio: unua premio — **Penka Papazova** el Jambol, dua premio — **Dančo Danĉev** el Plovdiv kaj tria premio — **Ivan Sivarov** el Plovdiv. Pri traduka poezio ne estis premioj pro la malalta lingva kaj stila nivelo de la prezentitaj materialoj.

Grandan intereson al la interŝanĝo de spertoj en la E-agado elmontris la 14-membra grupo de medicinistoj, reprezentantoj de la Societo de Esperantistoj-Medicinistoj „Septembra Gloro“ el Miĥajlovgrad kune kun sia prezidantino kaj vicprezidantino de DE de BEA en Miĥajlovgrad Natalija Tiškova, alvenintaj speciale por interŝanĝi sperton kun esperantistoj el la Medicinista E-societo „D-ro Zamenhof“ en Loveĉ. Estis multaj demandoj kaj eldiroj. La komuna konstato estis, ke la medicinistoj, kiuj, dank' al la posedo de latina lingvo, estas tre faciligitaj en la studado de Esperanto, devas utiligi ĝin kiel tre taŭgan komunikilon por interŝanĝo de sperto kaj scioj kun medicinistoj el la tuta mondo.

La kluba agado de la esperantistoj ĉe la Distrikta Sindikata Kulturdomo en Loveĉ ankaŭ tre interesigis la partoprenintojn, samkiel la sperto de Loveĉanoj en la organizado de internaciaj E-seminarioj kaj laborbrigadoj.

D-rino Tjuran OMER

NOVELEKTITA LANDA SEKCIESTRO DE ILEI

Dum kunsido de la Landa Sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEI) en Bulgario, okazinta la 10-an de majo j. k., kiun partoprenis 6 el entute 8 membroj, nia ŝatata estrarano Marin Bacev estis elektita nova landa sekciestro de ILEI. Kiel sekretario de la Instruista Sekcio ĉe BEA kaj ĉefmetodikisto pri E-instruado ĉe ties Centra Estraro, li redaktas oficialan bultenon „Informilo pri instrua laboro“, celanta plibonigon de la instrumentadoj de Esperanto kaj serĉanta vastajn kontaktojn kun eksterlandaj E-instruistoj. La bulteno ofte aperigas adresojn de eksterlandaj instruistoj kaj lernejoj, dezirantaj kontaktigi kaj korespondi kun bulgaraj gekolegoj kaj samaguloj. Por ricevi senpagan specimenon de „Informilo“, bonvolu skribi al: **Marin Bacev, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97, Bulgario.**

Rimarkigo: En la ĵus aperinta belaspekta **Informa libreto 1983–84, BEA**, sur paĝo 24, linio 13 desupre, sub la sub titolo **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj** estas presita la nomo de la eksa landa reprezentanto. Estu afablaj korekti ĝin jenmaniere: **Landa sekciestro Marin Bacev, 1000 Sofio, P. K. 1054, Bulgario.**

La Organiza Komitato de IFER (Internacia Foiria Esperantista Renkontiĝo) en Leipzig havas kelkajn kaŭzojn por danki al BEA pro la multflanka subteno de nia arango.

Unue Vi tre malavare sendis donace al ni bonegajn broŝurojn pri la vivo kaj agado de Georgi Dimitrov, kiujn ni disdonis al ĉiuj partoprenantoj en IFER. Due, vi subtenis la partoprenon de la eksterordinare bona Duo „Espero“ el Plovdiv, kiu dum unu semajno trifoje muzikis ĉe ni tre bonkvalite kaj kun multaj aplaŭdoj.

Kaj ne laste Via elstara k-do Nikola Aleksiev verkis por ni emociigan kaj valoran prelegon, kiun tralegis k-do Jordan Angelov.

Estimataj geamikoj, ni sincere dankas al Vi. Dankeme kaj tre kore salutas

MICHAEL BEHR,
komisiita de OK de IFER

E-ARANGO EN SVOGE

Antaŭ nelonge en Politeknika Gimnazio „Diĉo Petrov“ en urbo Svoĝe okazis E-solenajo, dediĉita al la Septembra Ribelo en 1923. La poeto Ivan Rudnikov renkontiĝis kun lernantoj, instruistoj kaj gastoj. Li legis siajn verkojn kaj respondis demandojn.

Lernantoj-esperantistoj plenumis recitalon, per kiu ili ĉi-jare partoprenis la XVI Nacian Revuon de E-Parolo kaj Kanto en Kazanlâk kaj okupis trian lokon.

Neforgesebla restos tiu kara renkontiĝo en ĉiuj koroj.

Elena RADENKOVA

„ANTAŬEN! LUMAS LA SCIENCO...“

Ĉiujare la plovdiva E-societo „Kulturo“ kune kun la legejo „Ivan Vazov“ festas la belan feston 24-a de Majo — Tago de la Bulgara Klereco kaj Kulturo. La kontaktoj kun tiu legejo ne estas novaj. Kiam la societo ne havis sian klubejon, en la legejo okazis la E-kunvenoj kaj tie estis konservataj E-libroj. Poste la kontaktoj ĉesis por longa tempo. En 1978, per protokolo pri kunlaboro inter E-societo „Kulturo“ kaj legejo „Ivan Vazov“ la rilatoj estis restarigitaj.

Ankaŭ ĉi-jare, la 20-an de majo, en la societa klubejo estis aranĝita solena vespero, malfermita per recitalo „Dum la jarcentoj kun ABC“ de la aktorino Veselina Kurteva.

Estimata gasto de la kunveno estis la konata legeja aganto Teodosij Vraĉev. Koncizan skizon pri li tralegis la esperantistino Katja Petrova-Rajĉeva. Poste ŝi emfazis la aktivan legejan agadon de la E-rondetoj ĉe legejo „Hristo Smirnenski“ kaj elementa lernejo „Vasil Petleŝkov“. Katja Petrova-Rajĉeva parolis ankaŭ pri aliaj legejaj agantoj-esperantistoj — Veselina Kurteva (prezidantino de legejo „Ivan Vazov“ kaj Stojanka Maĝunova.)

Teodosij Vraĉev, kiu okupiĝas pri la historio de la legejoj en Plovdiv kaj la distrikto, parolis pri sia estonta verko „Arkiva legeja albumo“. La ĉeestantaj esperantistoj gratulis lin pro lia kontribuo kaj meritoj al la legeja agado.

V. ĤRISTOVA

Por unua fojo ĉi-jare la Printempaj E-Kursoj okazis en Sofio, inter la 3-a kaj 9-a de aprilo. Ilin organizis la Instruita Sekcio de BEA kaj la Urba Estraro de BEA — Sofio. La rezulto superis ĉiujn atendojn: 116 personoj aliĝis al la kursoj, do 4—5-oble pli multe ol en la aliaj urboj, kie ili okazis ĝis nun. Oni dividis la gekursanojn en grupojn jene: I grado — 55 personoj (montriĝis necese formi du grupojn sub la gvidado de Nedka Valjaviĉarska kaj Cvetanka Kostova), II grado — 36 personoj (gvidanto Kunĉo Vălev) kaj III grado — 25 personoj (gvidanto Violin Oljanov). La kurso partoprenis ĝesperantistoj el ĉiuj partoj de Bulgario. La plimulto de ili loĝis en komunloĝejo, la aliaj restis ĉe parencoj kaj konatoj. Ne estis malgranda ankaŭ la nombro de sofianoj, kiuj aliĝis al la kursoj, pagante nur modestan kotizon.

La gekursanoj ne nur obstine laboris por ekposedo de la lingvo, sed ankaŭ sukcesis trarigardi la ĉefurbon. Ili konatiĝis kun ĝiaj vidindaĵoj, vizitis teatron, operon. Ili havis eblecon ankaŭ renkontiĝi kun sofiaj esperantistoj en kunveno, organizita de la Sofia Esperantista Kulturcentro „Maksim Gorkij“. Post la kunveno speciale por la partoprenantoj en la kursoj oni okazigis diskotekon.

Post unusemajna streĉa laboro la gekursanoj, kiuj sentis sin pretaj, faris ekzamenon. Por akiro de unuagrada diplomo ekzameniĝis 31 personoj, el kiuj 28 sukcese. Por la II grado estis ekzamenitaj 20 personoj, el kiuj sukcesis 16. Por la III grado sukcese faris ekzamenon 8 kandidatoj.

La ĉi-jaraj Printempaj E-Kursoj estas granda sukceso en nia instrulaboro. Ties okazigo montras, ke estonte vintraj kaj printempaj unusemajnaj E-kursoj povus okazi en Sofio malgraŭ la ekzistantaj ĉi tie malfacilaĵoj, aparte ĉe enloĝigo.

BISTRA DOJĈINOVA —
organizanto en Instru-Metodika Centro de Esperanto
ĉe la Urba Estraro de BEA — Sofio

PARE'83

La 14-an kaj 15-an de majo k. j. en Ruse okazis la tradicia printempa E-renkontiĝo RARE'83. Por interŝanĝi pozitivan sperton pri la lernado de la internacia lingvo Esperanto kunvenis gastoj el la ĝemelo de Ruse urbo Potsdam — GDR, el Hungario kaj Aŭstrio, esperantistoj el Sofio, el la distriktoj de Ŝumen, Veliko Târnovo, Plevn, Mihajlovgrad, Pazargik k.a.

La programo de PARE'83 estis dediĉita al la 60-jariĝo de la Septembra Ribelo en 1923. Okazis multaj interesaj arangoj. Unue en la Distrikta Junulara Domo renkontiĝis la partoprenantoj en la junulara sekcio. Ili interŝanĝis spertojn pri la lernado de Esperanto.

Sekvis jubilea E-kunveno, dediĉita al la 60-jariĝo de la Septembra Ribelo en 1923. Raporton faris la reprezentanto de la Distrikta Estraro de BEA — Ruse, Ganju Naĉev. Salutparolis ankaŭ la eksterlandaj gastoj. Post la oficiala parto estis prezentita riĉa literatura-muzika programo fare de amatora E-teatro kaj aliaj amatoraj grupoj el Ruse.

La amika vespero sabate pasis tre interese. La programo estis riĉigita per gajaj kvizoj kaj kantoj en Esperanto.

Dimanĉe okazis la tria laŭvica renkontiĝo de kooperativanoj-esperantistoj. Ĉi-jare ĝi pasis sub la devizo „Esperanto en la kooperativoj!“ Raporton faris la prezidanto de la Kooperativa Sekcio ĉe BEA Dimităr Mutuŝev. Li substrekkis, ke la devizo, levita de la bulgaraj kaj hungaraj esperantistoj por enkonduko de Esperanto en la kooperativan sferon, trovas konvencan grundon en Ruse kaj ne hazarde ĉi tie okazas la ĉiujaraj kooperativaj renkontiĝoj de la sekcio.

La gastoj, akompanate de la dommastroj, ekkonis vindadojn, monumentojn kaj ripozlokojn de la laboruloj en Ruse.

ELENA KAZANĜIEVA

JUNAJ ESPERANTISTOJ

Ekde 1982 E-rondo funkcias en Dua Elementa Lernejo „Nikola Vapcarov“ en urbo Novi Pazar. Ĝiaj membroj estas 42 gelnantoj el sesa kaj sepa klasoj. Kun vigla intereso ili lernas la Internacian Lingvon sub la gvidado de la instruistino Neli Dimitrova. Ili jam korespondas kun leteramikoj el Hungario, Ĉeĥoslovakio, Vjetnamio kaj Japanio.

La 19-an de marto 1983 16 gelnantoj-esperantistoj kune kun sia kursgvidantino partoprenis la regionan revuon de E-parolo kaj kanto en Sumen.

Ili senĉese plimultigas kaj plibonigas siajn E-kontaktojn kun eksterlandaj geamikoj kaj kontribuas al la paco kaj kompreniĝo inter la popoloj. Ilia devizo estas: „Esperanto estas ponto de la paco kaj amikeco inter la homoj“.

N. GEORGIEVA

FRUKTODONA PARTOPRENO

Konforme al la Kontrakto pri Kunlaboro inter DE de BEA — Plovdiv kaj DE de E-Asocio de GDR — Leipzig, subskribita en 1977, kaj al la Protokolo por 1982/83, kvarmembra delegitaro el Plovdiv vizitis la Internacian Foiron E-Renkontiĝon (IFER'83) en Leipzig, dediĉitan al la 50-jara jubileo de la Lejpciga Proceso. La delegitaro konsistis el: Jordan Angelov, kaj Dančo Danĉev — reprezentantoj de la Buroo de DE de BEA — Plovdiv kaj Duo „Espero“ (pianistino Mariana Ikonomova kaj violonisto Petăr Kostadinov — reprezentantoj de la plovdivaj E-societoj „T. Sofroniev“ kaj „Kulturo“).

La 11-an de marto oni solene malfermis la aranĝon. Ĉeestis 173 personoj el GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgario, FRG. Salutparolis reprezentantoj de la dommastroj kaj de la ĉeestantaj landoj. En la nomo de Bulgario salutis J. Angelov kaj transdonis donacon al DE de E-Asocio de GDR — Leipzig.

Per verkoj de Brams kaj Strauss debutis Duo „Espero“ Ĝi estis vigle aplaudata, dufoje estis bisita kaj plenumis pliajn verkojn.

La laborprogramo de IFER'83 okazis la 12-an de marto. J. Angelov traigis raporton de Nikola Aleksiev pri temo Georgi Dimitrov „Venkinto en la pabatalo. Raportojn faris Detlev Blanke (GDR) kaj reprezentanto de Ĉeĥoslovakio. En la diskutado oni alte pritaksis la raporton de Nikola Aleksiev. Sekvis vizito al la Muzeo de Georgi Dimitrov sub esperantlingva gvido.

Dimanĉe (la 13-an de marto) okazis nova koncerta programo de Duo „Espero“, konsistanta el verkoj de Mozart. La 15-an de marto la artistoj prezentis trian koncerton en daŭro de 90 minutoj. La repertuaro enhavis bulgarajn kaj jugoslavajn kantojn kaj hungarajn ĉaradaĵojn. La koncerto okazis en moderna halo en la t.n. „Spegula Salono“. La ĉeestanta publiko konsistis el lejp

ciganoj kaj ĉeestis ankaŭ esperantistoj. La artistoj estis bisitaj sesfoje kaj plenumis aldonajn verkojn.

IFER'83 pasis je tre alta nivelo. Kompare kun IFER'81 estas rimarkebla granda progreso en ĉiuj sferoj de la organizo kaj en apartaj programeroj.

JORDAN ANGELOV

NOVA MEDICINISTA E-SOCIETO

Omaĝe al la 60-jariĝo de la Septembra Ribelo medicinistinoj, kiuj partoprenas en E-kurso kun lektoro Natalija Tiškova, fondis E-societon ĉe la Distrikta Hospitalo en Miĥajlovgrad.

La nova societo portas la nomon de d-ro Stamen Iliev (ĉefkuracisto de I Ribelula Lazareto en 1923, mortigita post la frakaso de la Septembra Ribelo). En la kuranta 1983 oni celebros 60 jarojn depost lia pereco kaj 100 jarojn de lia naskiĝo.

Kiel prezidantino de la societo oni elektis Vera Ivanova.

N. T.



INFORMO EL RUSE

La 3-an de majo k. j. la regulan semajnan kunvenon de E-societo „Libero“ — Ruse partoprenis la aŭstra vojaĝanto-esperantisto ing. Max Rieder.

La gasto sciigis, ke li entreprenis unumonatan vojaĝon tra Bulgario. Post la afabla permeso de la societanoj, dum unu horo ing. Rieder projekciis diapozitivojn pri diversaj landoj. Oni povis rigardi interesajn vidaĵojn de landoj, urboj, monumentoj, temploj, popoloj solenaĵoj. La gasto detale klarigis la lumbildojn kaj poste respondis multajn demandojn.

La prezidanto de DE de BEA en Ruse Georgi Dobrev dankis al la gasto pro la prezentado de diapozitivoj kaj bondeziris al li agrablan restadon en Bulgario.

Boris KAVALĜIEV

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BĀCEV, Vasil BOROVSANSKI, prof. Vasil ĈOĈOV, Dimităr ĤAĜIEV, Krăstju KARUCIN

Administranto — ASEN JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodio“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66

1 000 Sofio

GASTAMA MARO, ORAJ SABLOJ KAJ ... ESPERANTO

Oni nomas ĝin Nigra, sed ĝi estas ĉarmegal. . .

Nomoj ofte trompas, kelkiam ili estas hazardaj.

Kvazaŭ fandita oro etendiĝas la sabla strio de la marbordo — de la antikva urbo Kavarna norde ĝis la enfluejo de rivero Ropotamo sude. Kaj eĉ pli sude — ĝis la riveroj Veleka kaj Rezovska. Pli ol ducent kilometroj! Kaj kia sablo! Senfina, velura, karesata de la ondoj de la „dolĉa“ maro — la plej pura kaj plej „oksigena“ maro. Sur la sablo etendiĝas senfina vico da blankaj konstruaĵoj — hoteloj, ripozdomoj, vilaoj! . . De la plej norda parto de la marbordo ĝis ties sudo. La bulgaraj arkitektoj demonstris siajn kapablojn kaj kreas fantazion, enkorpiĝitajn en centoj da originalaj, modernaj hoteloj kaj ripozdomoj, kies pordoj dum la tuta jaro estas gastame malfermitaj por miloj da bulgaraj laboruloj kaj fremdlandaj gastoj el ĉiuj partoj de la mondo.

Milionoj jam estas la eksterlandanoj, vizitintaj la belegajn ripozkompleksojn „Rusalka“, „Albena“, „Oraj Sabloj“, kaj „Amikeco“ — en la norda parto, kaj „Suna Bordo“, „Kavacite“, „Primorsko“ — en la suda parto de la Nigramara bordo. Multaj el ili pasigas preskaŭ ĉiujare siajn feriojn en tiuj jam monde konataj kompleksoj.

Depost kelkaj jaroj, ĉiam pli ofte, sur la plaĝoj, en la hoteloj kaj sur la aleoj de „Albena“, „Oraj Sabloj“ kaj sur la stratoj de la Nigramara ĉefurbo Varna oni povas aŭdi Esperanto-parolon. Inter la amasoj da feriantaj fremdlandaj turistoj estas ankaŭ dekoj da geesperantistoj el diversaj landoj, kiuj ripozas kaj samtempe lernas Esperanton en la tilioj de la Internacia Esperanto-Kursejo.

Vidaĵo de somerrestadejo „Albena“ ĉe la Nigra Maro

Dum la someraj monatoj la Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) vige aktivadas. En la Instrua E-Bazo en Varna IEK aranĝas ĉiutagajn lernokursojn de 3-a ĝis 16-a kaj de 17-a ĝis 30-a de majo; de 1-a ĝis 14-a kaj de 16-a ĝis 29-a de junio; de 1-a ĝis 14-a kaj de 16-a ĝis 29-a de septembro; de 1-a ĝis 14-a kaj de 16-a ĝis 29-a de oktobro. Oni bonege kombinas la instruadon de la Internacia Lingvo kun riĉenhavaj amuzprogramoj, ekskursoj, sun- kaj marbanoj ktp. La gekursanoj loĝas en luksaj hoteloj kaj ripozdomoj en la kompleksoj „Oraj Sabloj“, „Albena“ kaj „Cajka“, ekskursas per ŝipo aŭ per aŭtobuso al la antikvaj pitoreskaj ĉemaraj urboj Balĉik, Nesebâr kaj Sozopol; vizitas kaj trarigardas la belegan Nigramaran ĉefurbon Varna kun ĝiaj vidindaĵoj: la ĉemara ĝardeno, la Akvario, la Mara Muzeo, la Maŭzoleo de la pola-hungara reĝo Vladislav Varnenĉik, pereinta en batalo kontraŭ la osmanaj sklavigantoj (la batalo okazis apud Varna en 1444); la Arkeologia muzeo, la ruinoj de konstruaĵoj el la romia epoko kaj multaj aliaj interesaj vidindaĵoj.

La gekursanoj pasigas agrablajn horojn en internacia esperantista etoso: ili dancas en la diskoteko, ĝuas gajajn programerojn, spektas filmojn kaj diapozitivojn. Ili multon ekscias pri la antikva kaj moderna historio de Bulgario, pri la nuntempa vivo de la bulgaroj, pri iliaj atingoj en la konstruado de l'socialisma socio.

La gekursanoj, kiuj finas la diversgradajn kursojn de IEK, ricevas specialajn diplomojn-atestilojn pri lingvoscio. Ili forlasas Bulgariion pliriĉiginte siajn konojn pri nia malgranda, ĉarma kaj prosperanta lando, iom enamiĝintaj al ĝia gastama popolo, al la ĉarma Nigra Maro kun ĝiaj oraj sabloj, trovintaj novajn sincerajn amikojn.

ANGEL TODOROV

